

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## En la nokto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

La viv' ekstere nun silentas,  
 Ne estas lum-radi',  
 Tim-tremon mia koro sentas,  
 Ennokten aŭdas mi.

Nun, kiam disfluinta estas  
 De l' tag' malharmoni',  
 Ho, kio kiel gajno restas  
 Nun, laca hom', al vi?

La lun' konsole jen trankvilas  
 Post mallevig' de l' mond',  
 La sanktaj steloj sole brilas  
 Sur la ĉiela rond'!

Vagante sur malhela maro  
 Veturas mi, Sinjor'.  
 Min gvidas Via or-stelaro  
 Ĝis de l' etern' aŭror'.

*Traduko de la Germana poemo "In der Nacht" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 - †1857-11-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1989-04.*

*MR-221-1 / Arg-226-446 (2004-04-23 09:44:54)*